« LA BELLEVILLOISE : KULTURA FORTIKAĴO »

**** Fondita en 1877 post la «KOMUNUMO», La Bellevilloise, unua pariza kooperativo, celis ebligi al modestaj homoj, ke ili atingu politikan edukon kulturon. SAT, en la komenco, antaŭ sia nuna sidejo havis sian tiaman tie.***

Sendependa loko, artista kaj festa.

Loko de rezistado, de unuaj komercaj interŝanĝoj « de la produktanto al la konsumanto », egalrajta komerco antaŭmoda, kaj de spektakloj, **La Bellevilloise** ludis de 1910 ĝis 1949 unuarangan rolon en la ekonomia kaj kultura vivo de Orienta Parizo.

De post 2005, Renaud Barillet, Fabrice Marinez kaj Philippe Jupin, triopo da agitantoj el la vivanta spektaklo, de la produkto kaj medioj malfermis al la Parizanoj tiun memorlokon pri pariza historio, kun forta projekto : redoni vivon al la spirito de **La Bellevilloise,** kreante grandan sendependan lokon pri artistaj kaj eventaj aktivecoj por la publiko, entreprenoj kaj medioj, unika en Parizo.

La Bellevilloise : Kultura fortikaĵo

Januare 1877, post « **la Komunumo** », en la 19a kaj 20a parizaj kvartaloj ankoraŭ kontuzitaj pro subpremo, dudeko da laboristoj, el kiuj dek-ok mekanikistoj, starigas la trian kooperativon de Belleville, etan deponejon de spicejoj, kiu malfermiĝas du vesperojn semajne kaj kie ili laŭvice, post sia labortago, zorgas pri la vendoj.

Ĵus antaŭ la milito 1914-1918, forta je siaj 9000 socianoj ĝi estas la unua pariza kooperativo , eĉ la unua en la lando; ja iagrade ĝi iĝas modelo.

Tiam, en « **La Popola Domo La Bellevilloise** », dum Jean Jaurès tenas politikajn kunvenojn ĉe la unua etaĝo, teretaĝe, eksperimentiĝas unua antaŭvido de « **egalrajta komerco** » laŭ principoj de Joseph Proudhon, sin apogante sur devizo, kiu markos la historion de interŝanĝoj : « **de produktanto al konsumanto** »

Tereza